# *Kubo fabrikis la unuajn 150 mil vakcinojn de Soberana 02*

*Image not found or type unknown*



**Anoncas Kubo produktadon de la unuaj 150 mil vakcinojn Soberana 02**

Havano, feb 10 (RHK) Kubaj sciencistoj anoncis dum kunsido kun la prezidento Miguel Díaz-Canel, la produktadon de la unua stoko de 150 mil vakcinojn Soberana 02 kontra? la  kronviruso Sars-Cov-2.

Dum la semajna kunsido de la kuba ?tatestro kun la sciencistoj laborantaj en la diversaj vakcinaj kandidatoj de la insulo, la ?enerala direktoro de la Instituto Finlay de Vakcinoj, Vicente Verez Bencomo anoncis la “esperoplenajn rezultojn” de la kandidato Soberana 02.

Li sciigis ke “la lasta pozitiva nova?o estas ke nia sukcesis produkti stokon de 150 mil dozoj,  kun tre bona rezulto kaj tio reprezentas sciencteknikan atingon tre gravan”.

Li aldonis ke la instituto jam fabrikas grandskale por iniciati venontan marte la fazon III de la klinikaj provoj.

Soberana 02 estas unu el la kvar kandidatoj vakcinaj evoluigataj de Kubo en la batalo kontra? la Covid-19.
Kubo anka? evoluigas la kandidatojn Soberana 01-kies unua fazo de la klinika provo jam fini?is-, Mambisa kaj Abdala, kiuj anka? prezentas pozitivajn rezultojn.

Fonto: NTV

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/247266-kubo-fabrikis-la-unuajn-150-mil-vakcinojn-de-soberana-02

**Radio Habana Cuba**